

& Dolora saluto:

< Rekante 18 el 37 batoj por strofo, entute 935 paŝoj dum 11 minutoj. Verkis Kálmán Kalocsay (1922) "al la hungara landa kongreso en Miskolc". Baladigis Martin Strid (2016) per novaj melodio kaj rekantaĵo.>

(#Melodio:

<1,5:55> (/mi La LaLa miimimi re dore mimi; mi do dodo miimimi re dore mi i;mi La LaLa miimimi re dore miimi; mi do dodo miimimi re doTi La;

(#Rekantaĵe: mi do dodo mimi rere dore mimi; mi dodo mimi rere dore mimi; mi dodo dodo mimi rere dore mimi; mi dodo mimi rere doTi La))×17)+

(&Strofoj:

'1 /Ne oraj trumpetoj kun ĝoja sonoro, ; Nek liro arĝenta kun silka ruband', ; Nur kordoj obtuze sonantaj de l' koro ; Salutas vin, fratoj el tiu ĉi land'.

(×: **Fremduloj dividis nian karan landon. ; Ho, malaperu tiu raba bando! ; Ĉar ni naskiĝis kaj ni kreskis sur ĉi tero ; el ĝi kreiĝis nia korpa sang'.**)

'2 Ekfrapus mi koron por festaj akordoj, ; Por gajo solena, por ĝoja ekstrem', ; Sed kuŝas senforte, malstreĉe la kordoj, ; Sub fingro frapanta eksonas nur ĝem'.

'3 Jen, poplo hungara — ŝirata de vento, ; Velkfalas jam ĝia folia ornam', ; De sud', oriento, de nord', okcidento, ; Ĝin blovas samumo de arda malam'.

'4 Ve, poplo hungara, senfrata kaj sola, ; En nuda dezerto soifas ĝis sven'. ; Jam mankas al ĝi eĉ la revo konsola, ; Pri pluvo de amo, pri pluvo de ben'.

'5 Jam kie la floroj, la zumo ebria ; En vento printempa? Jam kie la pomp' ; De fruktomatur en aŭtuno radia? ; La trunkon mordatan minacas la romp'.

'6 Ho, poplo hungara, popolo hungara, ; Ho nova Lazaro en kria mizer'! ; Popol' senigita! Al mondo avara ; Do petu, petegu pri seka paner'!

'7 Kaj — vidu la mondon! En sanga nebulo ; Droninte baraktas la tuta homar', ; Kaj ĉie inkubo, detruo kaj brulo, ; Subpremo, malamo kaj murdoprepar'.

'8 Ho, kiu forrabis la dolĉajn momentojn ; De temp' idilia, de kora kviet', ; Stultetajn dezirojn kaj molajn revsentojn, ; Vesperojn afablajn kun roza ridet'?

'9 Ho, kiu distaŭzis la ĝojajn mienojn ; Kaj ŝtelis la ruĝon de vang' de infan', ; Plenigis per dornoj de zorg' la kusenojn, ; Ho, kiu forrabis la molon de l' pan'!

'10 Forfluis la sango... Kaj aman florĉenon ; Ni revis post longa malama sufer'... ; Ho, kiu preparis teruran venenon ; El sango fluinta, por trinko de l' Ter'!

'11 Malama venen' en sovaĝa ebrio ; Pelegas Homaron al danco de Vit'. ; Kaj ludas orkestro de ĝemo, vekrio, ; Kaj supre rikanas fantom' de Milit'!

'12 Ho fratoj, ho fratoj, se ĉiuj trezoroj ; De ĝojo, feliĉo perdiĝis eĉ jam: ; Ni premu gardante la manojn al koroj, ; Ne lasu, ne lasu la senton de Am'!

'13 Se tranĉas sin mem la Homaro per glavo, ; Ni krii tra ĝemoj, dentgrincoj kaj ve': ; La Amo: la Pravo! ĝi estas la Savo, ; Ĝi estas la Beno, ĝi estas Kre'!

'14 Ĝi estas radie brilanta lumturo ; En skua, detrua ciklono de mar': ; Ĝin sekvos, aŭ en ĥaoso, teruro, ; Abismo pereos la tuta Homar'!

'15 Kaj estas la lasta moment' por elekto, ; Kaj por la decido pri l' propra destin'! ; Al Vivo kondukas la unu direkto, ; Kaj gvidas la vojo alia al Fin'!

'16 Homar', ĉu la veo ne estis sufiĉa? ; Ĉu volas vi ĉeson de ploro kaj ĝem'? ; Al alto serena, al ĝojo feliĉa ; Jen vojo, Homaro! Ho, amu vin mem!

'17 Kaj tiam sub pompe festantaj festonoj ; Solenaj fanfaroj kun ĝojharmonioj, ; Kaj gorĝoj muĝantaj de hommilionoj ; Anoncos alvenon de l' Lando de Di'!